


Numero: 302.
Julio 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Forgesi la gepatran lingvon

Timigan fenomenon mi atentis antaŭ nelonge. El miaj gekonatuloj kelkaj translokiĝis al iu okcidenta lando por labori.

Ili estas eksterlande depost monatoj aŭ unu aŭ du jaroj.

En fejsbuko mi ofte sekvas ilian vivon. Nuntempe tio ĉi jam ne estas miraklo. Oni vivu en iu ajn lando fore en la mondo per interreto li/ŝi estas videbla. Ni scias pri li/ŝi ĉion.

La terglobo malgrandiĝis. Ĝi fariĝis eta planedo en la vasta universo.

Komence post la forveturo ili ankoraŭ uzis la hungaran lingvon dum la babilado, kiam ili komunikis unu kun la alia.

Laborante ili devis ellerni la lokan lingvon. La novaj geamikoj estis eksterlandanoj. Kiel la semajnoj, monatoj, eĉ jaroj pasis ili uzis fremdan lingvon pli ofte dum la komunikado.

Unue ili babilis en fejsbuko nur kun la eksterlandaj geamikoj, gekolegoj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi malgaje rimarkis, ke ili babiladas en la loka lingvo unu kun la alia.

Por mi tiu ĉi fenomeno estas timiga. Ili forĵetas sian belegan gepatran lingvon.

Eble estas tiuj, kiujn tio ĉi ne interesas, eĉ ili fanfaronas pri la rapida lingvolernado.

Verdire fremdan lingvon ellerni plej rezulte oni povas eksterlande. Ĉiu scias, surloke la lernado estas pli rapida kaj eble pli facila.

Ne tio estas la problemo, ke ili ellernas iun fremdan lingvon. Ja scii kaj komprenigi nin estas bonega afero.

Mi timas, tiuj ĉefe gejunuloj forgesos aŭ malĝuste uzos sian gepatran lingvon.


Mi estus pli trankvila, se ili parolus, skribus hungare unu kun la alia. Oni ne devas honti la hungaran lingvon.

Laŭ mi nia lingvo estas la plej belsona, esprimplena en la mondo.

Krome hungaroj, kiuj nun vivas kaj laboras eksterlande, ili neniam forgesu tiun lingvon per kiu ilia patrino instruis al ili la unuajn vortojn super la lulilo.

Bonega afero estas fejsbuko. Malgraŭ tio, ke allogas ĉiun paroli, skribi en iu mondlingvo.

Mi tre esperas, kiam miaj gekonatuloj revenos al Hungario, ili ankoraŭ ne forgesos la gepatran lingvon. La lernitaj lingvoj nur riĉigos ilin. Ili ĉiam restos hungaroj, kiuj estas fieraj, ke ili posedas admirindan lingvon.



— Redaktanto —

Fremdulo

Nokte Nekonata flugobjekto suferis akcidenton proksime de la vilaĝo. Matene kamparano ekvidis la globforman, ĉielan flugveturilon.

Li tre surpriziĝis. Vere vespere li drinkis tro multe en la drinkejo. Malgraŭ tio li jam estas sobra. Ne povas esti, ke li ankoraŭ estas ebria kaj halucinas.

Li timeme proksimiĝis al ĝi.

Ĉio estis silenta. En la objekto li vidis neniu, kiam enrigardis rondoforman, malgrandan fenestron.

Sed iomete flanke sur la kampo inter la herboj li trovis strangan estaĵon. Ĝi estis malgranda kaj similis al trijara knabeto. La estaĵo ankoraŭ vivis. Verdire ĝi estis grave vundiĝinta.

Per sia poŝtelefono li venigis al la flugobjekto la vilaĝan policiston, kiu estis klaĉema viro kaj rakontis la okazintaĵon al la vilaĝanoj.

Fine preskaŭ ĉiu alvenis. Ili ĉirkaŭstaris la flugobjekton kaj la duonmortan estaĵon.

— Laŭ mi ĝi estas inteligenta ulo, se ĝi alvenis ĉi tien per tia flugmaŝino – diris iu el la homamaso. – Ni provu komuniki kun ĝi!

— En kiu lingvo? – demandis la policisto.

— Kompreneble angle – venis tuj la respondo de la vilaĝa instruisto. – La angla estas mondlingvo. Ĉiu inteligentulo parolas ĝin en la mondo.

— Mi protestas – eklevis sian manon la pastro. – Ĉi tiu ulo venis el la kosmo. Dio kreis ankaŭ lin, kiel nin homojn. La lingvo de Dio estas la latina. Ĝi certe komprenas ĉi tiun lingvon.

— Stultaĵo! – diris maljunulo. – En la mezlernejo tiutempe ni devis lerni la francan. Mi estas konvinkiĝinta, per tiu ĉi lingvo oni povas esprimi sin plej perfekte.

— Ĉu france? – ekridis iu cinike. – Vi tute forgesiĝas pri la germana lingvo. La germana tamen estas elita raso. Ni parolu kun ĝi en tiu ĉi grandioza lingvo.

Erupciis granda diskuto. Ĉiu volis paroli kun la fremdulo kun sia favorita lingvo. Kelkaj gejunuloj eĉ proponis la ĉinan lingvon, ĉar la vundiĝinta ulo havis okulojn similajn al la ĉinoj. Sed eble ĝi estis pro tio, ĉar ĝia kapo grave vundiĝis kaj pufiĝis.

Anstataŭ porti ĝin al kuracisto la vilaĝanoj diskutis. Ili ne povis interkonsenti en kiu lingvo ili parolu al la fremdulo.

Dum ili diskutis ĝi neatendite mortis. Ĝi malrapide fermis la okulojn kaj ne movis plu.

— Ni jam povas babiladi kun ĝi en neniu lingvo – diris malgaje la vilaĝanoj.



— Ŝaŝa —

En la utero de gravedulino du embrioj babiladas

— Nekonata verkisto —

— Ĉu vi kredas la vivon post la naskiĝo? — demandas embrio.

— Kompreneble — respondas la alia. — Post la naskiĝo io devos okazi. Laŭ mi, mia ĉi tiea vivo preparas nin por la postnaskiĝa vivo. Por ke ni fariĝu sufiĉe fortaj.

— Stultaĵo, nenia vivo ekzistas post la naskiĝo. Cetero, kiel ĝi aspektus?

— Precize mi ne scias, sed certe tie estos pli multe da lumo ol ĉi tie. Eble ni havos proprajn piedojn kaj ni manĝas per nia buŝo.

— Ne, tio ĉi estas stultaĵo! — diras ridante la alia. — Ĉu ni iros per niaj piedoj kaj ni manĝas per nia buŝo? Tio estas ridinda. Ja tie ĉi estas la umbilika ŝnuro, kiu certigas la nutraĵon... sed mi diras al vi ankoraŭ ion: ni povas ekskludi la postnaskiĝan vivon, ĉar jam nun la umbilika ŝnuro estas tro kruta!

— Sed. Sed...io certe okazos. Nur verŝajne ĉio estos iomete kontraŭe, kiel ni al kutimiĝis ĉi tie.

— Nu aŭskultu min! Ankoraŭ neniu revenis post la naskiĝo. La naskiĝo signifas la finon de la vivo. Cetero la vivo estas granda malhela torturo!

— Mi ne scias, kia estos precize se ni naskiĝos, sed ni povos ekvidi nian patrinon, kaj ŝi tre atentos pri ni! — respondas unu esperplene.


— Ĉu patrinon! Ĉu vi kredas je patrino? Kie ŝi estas?

— Nu... ŝi estas ĉie, ĉirkaŭ ni. Ŝi estas ĉi tie ĉie, ni estas en ŝi kaj ni povas danki al ŝi nian ekziston. Sen ŝi ni ne estus.

— Mi ne kredas ĉi tion. Neniam mi vidis patrinon, do laŭ mi ŝi ne ekzistas

— Malofte — diras revante la alia — kiam ni estas silentaj vi povas aŭdi, ke ŝi kantas por ni aŭ vi povas senti, kiam ŝi karesadas nian mondon! Sciu, mi vere kredas, — aldonas ĝi — ke la vera vivo atendos nin nur post tio.

— tradukis: Apáti Kovács Béla —



Blinda knabino

— Nekonata verkisto —

Iam estis blinda knabino, kiu malamamis sin pro la blindeco. Ĉiun ŝi malamamis escepte sian karulon. La knabo ĉiam estis kun ŝi. Ŝi diris al sia amiko:

— Se mi vidus la mondon, mi edziniĝus al vi.

En iu tago oni donacis al ŝi okulojn. Kiam la kuracisto forigis la bandaĝon de sur ŝiaj okuloj, ŝi vidis la tutan mondon, eĉ sian amikon. La knabo demandis:

— Nun vi jam vidas la mondon, ĉu vi edziniĝos al mi?

La knabino rigardis al la knabo kaj ŝi vidis, ke li estas blinda. La fermitaj palpebroj tre ŝokis ŝin. Tio ĉi surprizis ŝin. La knabinon terurigis la penso, ke en la estonto ŝi devos rigardi tion ĉi. Ŝi malakceptis la peton de la knabo.

La knabo silente larmis, post kelkaj tagoj li skribigis leteron helpe de iu amiko: 'Atentu bone pri viaj okuloj, ĉar antaŭ ol ili fariĝis la viaj, ili apartenis al mi.'

— tradukis: Apáti Kovács Béla —



Poezio

Onidire nuntempe jam neniun interesas la poezio. Ne estas mode fariĝi poeto kaj ludi per la vortoj kaj esprimoj.

Niaj prauloj estis la majstroj de la versofarado. De ilia kantoj eĥis la mondo. Tiam ankoraŭ la poemoj estis valoraj. La homoj amase legis, deklamis poemojn.

Ne estus bone, se vere mortus la poezio, la poetoj malaperus el nia vivo. Ili donacas al ni belegajn versojn, kiuj ravas nin kaj nian cerbon ili igas pensi.

Do, ankoraŭ ni ne entombigu la poezion. Legu ni ĉiutage versojn. Kuraĝuloj verku poemojn ankaŭ en Esperanto.

— Adalberto —

Ivan Naumov

Babelo

Donu al mi fabelon,
Ĉar io almenaŭ restu,
Ĉar io almenaŭ nestu
En pingloza arbusto
de mia obskura anim'...
Kiam oni eniros Babelon
Ĉies vinoj restos sen gusto
Kaj ŝimos en ŝlim'.

Donu al mi intencon
Por io ankoraŭ tremu,
Por iun ankoraŭ emu
Longaj ŝtonaj strataroj
de mia vintroza intern'.
Kiam oni deklaras komencon
Ĉies varmo restos sen tegoj
En frosta kavern'.

Donu al mi nenion
Laŭ jam forgesita moro.
Laŭ jam forgesita foro
Eble glitos ombraro
de mia neĝoja esper'.
Kiam oni ektrovos la Dion
Ĉies dioj restos sen faro
Kaj mortos sur Ter'.

28/29.06.1993

Aleksander Fredro

Oni donis al azeno

Oni donis al azeno
en du trogoj
fojnon kaj avenon.
Turnas ĝi kapon, orelon,
fojn' odoras, logas aveno.
Kion manĝi ĝi decidos
kaj kontenta, sata estos?
Kion manĝi por ne bedaŭri?
hezitas la azeno
de mateno ĝis vespero.
Okazis, ke la azenon
inter tiuj plenaj trogoj
trafis pro malsato morto.

Tradukis Danuta Kowalska



Julian Tuwim

Birdo

Sur branĉeton bird' eksidis
ekpepetis, eksvingetis,
en plumaron frotis bekon,
balanciĝis la arbeton.
Kun sviĉo forflugis ĝi.
La branĉeto eksvingita,
tremas ege kontentita,
ke ĝin ekbalancis bird'.

Tradukis Danuta Kowalska



Por infanoj



La malgranda drako

La sepkapa drakopatro kaj la sepkapa drakopatrino havis fileton, la timeman drakon. Kompreneble ankaŭ ĝi havis sep kapojn, kiel la gepatroj.

Kiel mi jam diris, la drakido estis tre timema knabo. Ĝi eĉ timis ankaŭ de la eta muso. Se ĝi ekvidis ĝin, la malgranda drakoinfano tuj ekploris.

— Mi timas. Mi timas de la muso. Ĝi manĝos min – kriegadis la malgranda drako.

Pro tio ĝiaj gepatroj tre, tre malĝojis. Ili ne povis, kiel kuraĝigi sian ideton.

— Filo mia, - diris la patro – ni drakoj estas tre kuraĝaj estaĵoj sur Tero, La homoj timas de ni. Morgaŭ vi venos kun mi al la vilaĝo, kie ni timigos la homojn. Tie vi ellernos de mi, kiel fariĝi kuraĝa drako, kiu timas de neniu.

— Mi ne volas iri por timigi la homojn – ekploris la malgranda drako. – La homoj estas fortaj kaj ili havas pafilon.

Sed la drakopatro ne cedis kaj ĝia fileto devis akompani ĝin al la vilaĝo.

Dumvoje la malgranda drako demandis:

— Paĉjo mia, kiel ni timigos la homojn?

— Baldaŭ vi ekvidos. Ĉion faru tiel, kiel mi. Estos bonega amuzo vidi la multajn, kurantajn homojn. Ili petegos al ni, ke ni lasu ilian vivon. Sed ni al neniu indulgos. Per varmega flamo eliĝante el niaj sep gorĝoj bruligos ilin kaj ni ruinigos iliajn domojn.

Tio ĉi ne plaĉis al la malgranda drako. Ĝi ne komprenis, kial kaŭzi malbonon al la homoj. De eta birdo ĝi aŭdis, ke la homoj havas infanojn, kiuj tre ŝatas ludi. Kiom bonege estus, se iam ankaŭ ĝi povus ludi kun la infanoj.

Baldaŭe ili atingis la vilaĝon. La homoj panike forkuris kaj kaŝis sin por savi la vivon. Ili nenie trovis homon krom malgranda knabeto, kiu ludis sur la korto.

Strange la knabeto ne timis de ili, eĉ li proponis al la drakoinfano, ke ĝi ludu kun li:

— Venu ludi kun mi! – li diris. – Hodiaŭ de mia avo mi ricevis pilkon. Ĉu vi deziras piedpilki kun mi?

La malgranda drako unue rigardis al sia patro, kion fari en tia situacio. La patro ne volis permesi la ludon kun la knabeto.

— Mi malpermesas, ke vi ludu kun li. Ni venis al la vilaĝo pereigi ĉion.

— Kara paĉjo, permesu al mi piedpilki nur kvin minutojn. Mi petegas! – diris la malgranda drako.

Unue la drakopatro ne volis cedi. Ĝi ĉiel deziris, ke ĝia fileto fariĝu bona drako, de kiu la homoj tre timas. Sed vidante la knabeton, kiom li deziras ludi, fine ĝia koro moliĝis kaj ĝi permesis ludi kvin minutojn kun la knabeto.

La du knaboj ludis ĝis vespero. La drakoknabo vespere jam ne volis timigi la homojn. Ili iris hejmen.

Alitage la malgranda drako denove akompanis sian patron. Ĝi denove trovis ludkamradon kaj la timigado estis prokrastita. Tiel ĝi daŭris dum tagoj.

En iu tago la malgranda drako diris:

— Paĉjo, mi amas la homojn. Vidu, iliaj infanoj estas miaj geamikoj. Mi petas vin, ni ne timigu ilin! Ankaŭ vi amu la homojn!

La maljuna drako longe cerbumis, kion fari. Eble ĝia fileto pravus kaj ne estas bone, se ili timigas la homojn kaj ili kaŭzas malbonon.

Okazis miraklo. La sepkapa drako kun la familio ŝanĝiĝis kaj fariĝis bonaj amikoj de la homo.

Dank' al la malgranda drako, kiu montris al sia patro, ili povas vivi ankaŭ sen malamo.

Ankaŭ vi paciĝu kun viaj malamikoj, ĉar tiam sur nia tergloblo estos pli bona vivo.

— La onklo Adalberto —



Humuro

Du avaruloj ekskursas al la arbaro. Subite iu avarulo devas kaki. Li iras malantaŭ arbuston. Li finis la aferon kaj li diras al sia kunulo:

- Ĉu vi havas paperon?
- Ba, amiko, ne estus tiom avara. Lasu tie ĝin!

— o —



— o —

Ebriaj avaruloj

- Kiel vi scias, ke du avaruloj estas ebriaj?
- ???
- Unu disjetadas sian monon kaj la alia kolektas ĝin kaj redonas al la disjetanto.

— o —



— o —

- Panjo, mi ne deziras iri al Ameriko
- Silentu!
- Sed panjo, mi ne deziras iri al Ameriko.
- Silentu! Naĝu pli rapide!

— o —

Humuro

- Sinjoro doktoro, mia edzo imagas lin aŭtomobilo. Kion fari?
- Mi proponas, portu lin al mi!
- Mi ne povas, ĉar mi ne havas stirodokumenton.

— o —



— o —

Knabeto rigardas la geedziĝajn fotojn de siaj gepatroj.

— Panjo, kial vi survestis blankan robon? — li demandas.

— Tial karuleto, ĉar la blanko estas la koloro de la ĝojo kaj feliĉo.

— Nun jam mi komprenas, kial vestis paĉjo nigran veston.

— o —



— o —